J. DUBOIN / P.V. BERTHIER

# ABUNDO
# KAJ
# KONSUMSOCIO

Jacques Duboin : La granda liberiĝo de l'homoj pere de scienco
P.V.Berthier : Alveno de abundo kaj konsumsocio
(Ĉi-lasta teksto origine aperis en la franca revuo "Défense de l'Homme")
Ambaŭ elfrancigis la Abundana Frakcio de SAT

Suplemento
de
La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
104 A 1975 3 FF

BERGEON J-LUKO

BERGEON j-L

esperanto

nun

GRUPO ABUNDO-ESPERANTO
M.F.A.
47, rue de Miromesnil
PARIS-8

ABUNDECA FAKO
U.E.F.
34, rue de Chabrol
PARIS-10

# EKONOMIAJ VEROJ

(Politiko estas nur respegulado de ekonomio)

Por produkti, maŝino anstataŭas homon : a) pli granda produktado, b) senlaboro.

Ĉar ili ne havas aĉetpovon senlaboruloj ... ne povas aĉeti abundajn produktojn de maŝino (ĉeso de interŝanĝo) : MIZERO dum ABUNDO.

ABUNDO nuligas PROFITON, nur MALABUNDO ebligas komercon kun PROFITO.

En 1939, por bremsi ekonomian krizon, por vigligi interŝanĝon, por savi profiton, ONI BATALAS KONTRAU ABUNDO.

En Los Angeles (Usono) oni JETIS LAKTON EN KLOAKON, kaj la senlaboruloj, kiuj provis preni iom da tiu lakto per siaj teleroj, estis BASTONITAJ DE POLICISTOJ.

En Brazilio oni bruligis kafon, en Francio oni igis grenon maltaŭga por konsumado, oni elradikigis vitojn, kiam ĈIO MANKIS al multe da homoj.

Tiuj pacaj detruoj ne sufiĉis ... oni finvenis al granda detruo : MILITO.

Post milito ABUNDA produktado TRE RAPIDE revenas.

Por ne rekomenci tiun inferan ciklon, necesas : forlasi la interŝanĝan reĝimon « VENDI — AĈETI » kaj starigi *DISTRIBUAN EKONOMION*, kies bazo estas : a) MULTE PRODUKTI (sufiĉas ne bremsi la maŝinaron), b) DISTRIBUI tiun ABUNDAN PRODUKTAĴARON.

Por realigi tiun DISTRIBUON ORDE : necesas KONSUMA MONO garantiata de produktado anstataŭ de oro kiel sub interŝanĝa sistemo.

Ĉiujare, biletoj de tiu mono estos eldonataj laŭ KVANTO EGALA JE PRODUKTADO. Tiuj MONBILETOJ validos dum unu jaro. Oni povos uzi ilin NUR UNUFOJE. MONO MALAPEROS, KIAM LA VARO, kiun ĝi reprezentas, ESTOS KONSUMITA.

Konsekvence : ĉiujare la tuta PRODUKTAĴARO ESTOS KONSUMATA. NE PLU ekzistos NEVENDITAJ STOKOJ, ne plu SENLABORO, ne plu necesos BREMSI PRODUKTADON aŭ MAŜINARON.

Do, sekve de TEKNIKA PROGRESO, PRODUKTADO KRESKOS sen ia katastrofo ... ĉar komence de ĉiu jaro, ONI POVOS ELDONI PLI DA MONO, OL DUM LA ANTAUA JARO, do ... plialtiĝo de la aĉetpovo POR ĈIUJ. ABUNDO NE PLU estos KATASTROFO.

Kaj ŜPARADO ? ... Se ĝi iĝos neebla ĝi iĝos ankaŭ SENUTILA. ĉar ĉiu INFANO kiu naskiĝos RAJTOS VIVI, la SOCIO DEVAS GARANTII AL ĜI SENMANKAN VIVADON. Kaj ĉiu HOMO RICEVOS SALAJRON ĜIS SIA MORTO.

Kompense de tiu vivrajto, la individuo ŜULDOS al la socio SIAN LABORON laŭ siaj kapabloj, dum kelkaj jaroj en SOCIA SERVO, kies daŭro estos fiksita laŭ : a) bezonoj de la produktado, b) grado de disvolviĝo de maŝinaro.

Maŝinaro anstataŭ provoki krizojn kaj eksplodigi MILITOJN donos al homaro ABUNDON kaj TEMPON LIBERAN.

GESAMIDEANOJ! GEKAMARADOJ! « ĈIU HOMO RAJTAS PRI PARTO EL LA HEREDAĴO, KIUN PRETIGIS POR NI ĈIUJ ANTAUAJ GENERACIOJ ».

DISTRIBUA EKONOMIO efektivigos tiun rajton. La tempo urĝas. La kapitalista mono jam falas en ĉiuj landoj kaj faligas nin en la ĥaoson. Tiu mono staras nur tial ke la homoj KREDAS je ĝi, kaj ke ili tute ne konas la eblojn de la DISTRIBUA EKONOMIO.

Propagandu ĝin en viaj rondoj por ke ĉiuj organizoj atentu pri ĝi kaj ĝin enkonduku en siajn programojn.

STARIGU EN VIAJ LANDOJ MOVADOJN PRI DISTRIBUA EKONOMIO KAJ KUNLABORU KUNEKUN NI!

« NI ĴURIS LABORI, NI ĴURIS BATALI POR REUNUIGI L'HOMARON. » (Zamenhof.)

Jacques DUBOIN

# La

# granda liberiĝo de l' homoj

PERE DE SCIENCO

---

Elfrancigis kaj eldonis la
Abundana Frakcio de SAT

# L A   G R A N D A   L I B E R I Ĝ O

# D E   L' H O M O J

# P E R E   D E   S C I E N C O

-:--:-

## LA DISTRIBUA EKONOMIO

Logika kaj nepra rezultato de la preter-igita kapitalismo.

-:--:-

### L a   m e k a n i k a   r e v o l u c i o

Memorigu ni unue, ke riĉaĵoj, tio estas konsumot-aĵoj, ne povas esti kreataj sen iu uzo de energio (ĉi tiu vorto uzata laŭ scienca senco). Por plugi kampon per sia ŝpato, la kamparano uzas energion,kaj, je la fino de longa labortago, li sentas sin lacega, ĉar li uzis sian tutan energion. Ripozante kaj sat-manĝante, la laboristo redisponigas la energion, kiun li utiligos pli malfrue. Brulante, karbo produktas varmon, kiun oni transformas en energion por funkci-igi vapormaŝinon. Per uzo de ĉiuj formoj de energio ni havigas al ni krudajn materialojn kaj ilin trans-formas en manufakturitajn objektojn. Dank'al energio funkcias nia giganta ilaro, kiu provizas al ni ŝta-lon, lokomotivojn, aŭtomobilojn, aviadilojn, ŝipojn, ktp. Sen ĝi, neeblus provizumi, hejti, ŝirmi sin, la homoj ankoraŭ vagadus en la sovaĝa arbaro.

Energio povas esti mezurata laŭ varmo kaj oni ĝin esprimas per kalorioj: unu kalorio estas la varmokvan-to necesa por varmigi je unu grado unu kilogramon da distilita akvo; energio povas ankaŭ esti mezurata laŭ


laboro, kies unuo estas nomita ergo; kaj kiam oni konsideras la tempon dum efikas energio, la <u>potencon</u> oni kalkulas per vaporĉevaloj. Unu vaporĉevalo estas la laboro necesa por levi 75 kilogramojn ĝis unu metro dum unu sekundo. Preternotu ni, ke la potenco de vera ĉevalo superas apenaŭ la duonon de tiu de vaporĉevalo.

Oni konsentas kutime, ke la muskola energio de homo estas meznombre unu dekono de vaporĉevalo, ĝi ne povas eĉ liveri tion konstante, ĉar ĝi bezonas ripozon.

Oni asertas, ke homoj aperis sur la Tero ĉirkaŭ la fino de la terciara epoko, sed iliaj unuaj postsignoj, kiujn oni trovas, datiĝas de ĉirkaŭ 30 000 jaroj! Nu, se ni preskaŭ nenion scias pri la vivo de niaj praprapavoj, certe ili disponis nur sian muskolan forton, t.a. unu dekonon de vaporĉevalo. Per tiu malmulto da energio ili kreis siajn elementajn riĉaĵojn, kiuj konsistas nur el ĉasaĵo kaj fiŝoj, per kiuj ili sin nutris.

Figurante per la linio A.B. (bildo 1a) la 30 000 jarojn forpasintajn, oni facile desegnas la grafikaĵon de la potenco, kiun la homoj disponis. Tiu punktita linio montras la potencon vertikale, kaj la tempon horizontale. Ĝi restas proksimume horizontala dum 25 000 jaroj, tio estas ĝis A'.

En la daŭro de la 5 000 sekvantaj jaroj ,la homo provas pacience pligrandigi sian potencon




(Bildo 1a)

super la naturo. Ĝi iom kreskas, kiam la homo sukcesas malsovaĝigi la cervon, la elefanton, la kamelon, la ĉevalon, kiuj aldonas sian propran muskolan energion al la homa. Fine, utiligante la fluon de rivero por per ĝi funkciigi akvoradon, kaj la forton de la vento - kiam ĝi pri tio konsentas - por turnigi brakon de ventmuelilo, la homo sukcesas duobligi sian potencon ĉirkaŭ la

fino de la 18a jarcento. Oni vidas kiel ĝiaj progresoj estas malrapidaj ĉar, rilate al la energio, Napoleono la unua kaj la faraonoj estas samtempuloj: por veturadi ili uzis veturilon trenatan de ĉevaloj el karno kaj ostoj. Dum tiuj 5 000 jaroj proksimume, la grafikaĵo altiĝas de unu dekono de vaporĉevalo ĝis du dekonoj.

Subite fulmo ekbrilas. Antaŭ apenaŭ 170 jaroj, Watt elpensas la vapormaŝinon kaj tiu elpensaĵo, malfermante la epokon de la energio, estas transformonta la homajn sociojn. Efektive, je la unua fojo en la historio de l'mondo, la homo ekkaptas unu el la elementaj fortoj de la naturo: tiun, kiu dormas en la arbaroj de la prahistorio. Per la kapto de la privarma energio amasigita en la terkarbo kaj per transformado de ĝi en mekanikan energion, la homo estas uzonta ĝin por funkciigi maŝinojn. De tiam la naturajn fortojn ĝi uzos pli kaj pli anstataŭ la laciĝan penadon de siaj muskoloj. Al la ilo, simpla plilongigo de la brako aŭ de la piedo, la homo substituas energion tute apartan de la homa penado; tiu energio fariĝos preskaŭ neelĉerpebla fonto de konsumotaĵoj. Tio estas la plej grava okazaĵo en ĉiuj tempoj.

Preskaŭ senprokraste, la homo estras la energion ankoraŭ dormantan en la petrolo, kaj ankaŭ la elektron kiun nelaciĝeble produktas la akvofaloj. La potenco de la homo subite akiras mirigajn dimensiojn. Se dum 25 000 jaroj, la homo disponis nur unu dekonon de vaporĉevalo; se 5 000 jaroj ankoraŭ necesis por duobligi tiun negravan dekonon, nur kelkaj jaroj sufiĉos por kvarobligi tiun potencon, kaj poste malpli da tempo por dekobligi ĉi-lastan potencon. Tiel, jen estas nur unu ekzemplo: la mekanika potenco instalita en Francio estis 4 milionoj da vaporĉevaloj en 1906, 12 milionoj en 1926, 65 milionoj en 1931, 75 milionoj en 1939, kaj la progresado daŭras. Tiel, ĉiu franco, nuntempe, disponas fakte potencon de ok ĉevaloj, ĉerpitan el karbo, petrolo kaj elektro, havigantan al li praktike tiom da energio, kvazaŭ li havus okdek sklavojn je sia servo. (ciferoj de 1946, trad.noto).

Nia grafikaĵo, horizontala dum 25 000 jaroj, kaj iom supreniranta poste dum proks. 5 000 jaroj, subite saltas ĝis alteco okdekoble pli granda ol je la komenco (bildo 1a). Se la homaro ŝajnas al ni nun en plena efektiva bolado, kaj kvazaŭ turmentata de intensa febro, tiu linio de potenco prezentas sufiĉe bone la grafikaĵon de ĝia temperaturo.

Kaj la epoko de la energio estas tiu de gravaj eltrovoj: en 1790, Lebon eltrovis la lumgason; en 1803 Fulton konstruis la unuan vaporŝipon kaj Daleri (Dallery) elpensis la helicon. Dum Ĵakar (Jacquard) inventis la teksomaŝinon, Lavŭazje (Lavoisier) kaj Ŝaptal (Chaptal) kreis ĥemion. Ekde 1832, oni konstruas fervojojn; iom pli malfrue telegrafon; poste la unuan submaran depeŝkablon. En 1872, Gram (Gramme) turnigas sian unuan elektran maŝinon inversigeblan ; en 1882 Edison fabrikas elektran lampon. Poste oni ektransportas elektron longdistance; fiziko, ĥemio, agronomio , ktp,progresegas. Nur rilate transportojn, oni konstruas unu milionon kaj tri cent mil kilometrojn da fervojoj, kvardek milionojn da aŭtomobiloj, dekmilojn da ŝipoj kaj aeroplanoj.

30 000 jaroj estas tamen daŭro, kiun niaj sentoj ne perceptas. Por montri la subitecon de la fenomeno, S-ro Alfred Doërr imagis redukti tiun daŭron astronomian je la skalo de unu sola jaro.

En tiu hipotezo, la homoj aperas sur la Tero la 1an de januaro, kaj ni estas nun la 31an de decembro,kiam sonoras la lasta noktomeza frapo. Dividante per dek du monatoj la linion A.B., ja ni konstatas ke, ĉirkaŭ la 18a de oktobro komenciĝas la fer-epoko, kaj la 8an de decembro ekas la kristana epoko. Ekzamenante laŭ tiu vidpunkto, ni vidas, ke la homo disponis ĝis la fino de oktobro nur sian dekonon de vaporĉevalo. De la 1a de novembro ĝis la 29a de decembro, ĝia potenco altiĝis de unu ĝis du dekonoj de vaporĉevalo. Fine,la 30an de decembro, je la Oh 18 Uat (Watt) elpensas la vapormaŝinon kaj dum posttagmezo de la sama tago jam estas konstruata la unua fervojo. Sed la 31an de decembro progresoj torentas kiam, je la 16h14, eksplodas la milito de 1914, la homoj havas potencon kvaroble pli

grandan ol tiu de la hieraŭo. Kaj je la 21h30 (tio estas kvin horojn poste) la krizo de 1929 eksplodas; ĉiu homo disponas mekanikan potencon de ok ĉevaloj.

Tiel 364 tagoj sufiĉis por konkeri dekonon de ĉevalo, do por duobligi la muskolan potencon de l'homo.

Sed 24 horoj sufiĉis por okobligi tiun muskolan potencon.

Kaj nur kvin horoj sufiĉis por ĝin okdekobligi.

Depost 1929 (dato de la krizo, kiu forprenas kapitalismon), la potenco de homo kreskas ankoraŭ pli rapide, ĉar oni kreas elektrajn centralojn pli kaj pli gravajn. Kaj la atoma energio aperas ĉe la horizonto...

Kion faris la homoj per tiu miregiga trezoro de energio? Ili uzis ĝin por funkciigi maŝinojn, kiuj kreas abunde konsumotaĵojn kaj liberigas rapide la homon de ĝia miljara laboro. Jen kelkaj ekzemploj ĉerpitaj el diversaj fakoj de la ekonomio.

## La granda liberiĝo de l' homoj per la maŝino

Laborante per falĉilo, homo falĉas po tri aroj hore; per motorfalĉilo ĝi falĉas po unu hektaro hore: aŭ tridektrioble pli.

La rikolt-lig-draŝmaŝinoj multobligis la homan produktokvanton per 160: ili ebligas falĉi, draŝi kaj ensakigi la rikolton de 25 hektaroj dum dek horoj. Ĉie, kie oni uzas traktorojn, la manlaboro multe malpliiĝas.

Pri masonado, unu homo fabrikis unu kuban metron da betono dum sia labortago; iuj betoniloj produktas po 70 tunoj hore.

Laboristo faras mane dum sia labortago 450 brikojn. Per maŝino, li povas produkti 22 000 da ili.

La elfosado de 250 kubaj metroj, postulas la laboron de fosistoj dum 200 horoj, kaj la laboron de helplaboristoj dum 150 horoj: sume 350 horoj. Unu mekanika ŝovelilo, funkciigata de du homoj, plenumas la saman laboron dum ok horoj. Iuj kavigmaŝinoj ebligas elfosi 27 000 kubajn metrojn dum dudek kvar horoj.

La fabrikado de cemento pli kaj pli aŭtomatiĝas : per pneŭmatika martelpikfosilo unu kuba metro da kalkŝtonoj estas elfosata en tri minutoj dum unu horo estis necesa per pikfosilo. Unu laboristo pistas cent tunojn anstataŭ kvar tunojn ĉiuhore; bakado postulas nur duonhoron da homa laboro por unu tuno, anstataŭ kvin horojn; la ensakigo estas farita dudekoble pli rapide ol antaŭe.

En 1904, unu usona aŭtomobilo postulis 1 291 horojn da laboro; en 1923, 133 horojn; en 1929, 92 horojn; en 1936, 63 horojn. La fabrikoj, kiuj fabrikas la ĵipojn eksterigas po unu ĉiun duan minuton.

La A.O.Smith Corporation de Milwaukee fabrikas po 10 000 ĉasioj tage, t.e. unu ĉasion ĉiun trian sekundon. Ĉiu konsistas el 125 pecoj, kiuj, por esti eltranĉitaj kaj muntitaj necesigas 552 malsamajn agojn. 1 100 tunoj da ferladoj ĉiutage estas nombrataj,kontrolataj, ordigataj aŭ forĵetataj aŭtomate. Kiam ili atingas la laborĉenojn, ili estas eltranĉataj, premfiksataj, vinktataj po 60 vinktoj je ĉiu presbato. La fabriko laborigis, en 1928, 5 000 personojn. Pliperfektigante la aŭtomatecon de ĉiuj ĉi agoj, oni malpliigas la laboristaron ĝis 3 000 personoj en 1930, ĝis 234 en 1934. En 1938, tiu fabriko fabrikis ĉiutage 10 000 ĉasiojn pere de dudek tri laboristoj.

La kontrolado de radiovalvoj fariĝas aŭtomata po 14 000 ĉiun okan horon, dum bona laboristino kontrolas da ili ne pli ol 500 dum la sama tempo.

550 000 elektraj lampoj estas fabrikataj laŭ la Corning-procedo ĉiutage, dum la sama laboro postulis 4000 horojn.

En 1931, necesis dudek kvar maŝinoj kaj tridek laboristoj por alĝustigi 900 000 klapojn kun 2 % da forĵetaĵoj. Oni pagis 216 000 frankojn por salajroj. En 1933, pli perfekta maŝino ebligis al du laboristoj kontroli 1 380 000 klapojn: la salajroj falis je 16 200 F

En 1890 paro da ŝuoj postulis 12 laborhorojn; en 1934 nur unu horon.

Pri la nutra industrio, dum unu laboristo lutis 350 konservujojn en sia labortago, unu nura maŝino lutas 50 000 da ili dum la sama tempo.

En Ĉeĥoslovakio, sep vitrofarejoj en 1920 fabrikis 50 milionojn da botelojn ĉiujare per 3 000 specialistoj kaj 5 000 helplaboristoj. Kunigante siajn penojn,kvar fabrikoj, kelkajn jarojn poste, fabrikas cent milionojn da boteloj ĉiujare, per 1 000 laboristoj sume.

La lastaj trikmaŝinoj faras po 480 000 maŝojn minute. En Trojo (Troyes), la maŝinoj, kiujn uzas la trikistoj, faras unu paron da ŝtrumpetoj ĉiun trian minuton.

La kontregistraj maŝinoj, la kalkulmaŝinoj, ebligis treege malpliigi la laboristaron.

Produktado kaj distribuado de energio estas preskaŭ aŭtomataj. La deĵoranta inĝeniero havas antaŭ siaj okuloj la elektrajn centralojn, la ĉefajn arteriojn, la substaciojn,ktp , signalataj per lumstrekoj. Aparatoj indikas al li la elektran ŝargon de la kabloj kaj la nombron da generatoroj turniĝantaj en ĉiu fabriko. La plej eta akcidento estas al li signalata, kaj, premante butonojn, li estras la diversajn substaciojn kaj la interkoneksajn postenojn, same kiel la necesajn manovrojn por devojigi la trafikon sur alian linion. Se li eraras, tabelo tion signalas, kaj , se necese, la tuta aparato blokiĝas.

Ne utilas prezenti milojn da ekzemploj tiel facile kontroleblaj. En Usono, kie la statistikoj estas bone starigataj, enketo pri agrikulturo, elfosadа industrio, fabrikado de manufakturitaj artikloj, produktado de energio kaj transportadoj, konigis ke, de 1899 ĝis 1939, la nombro da laboristoj malgrandiĝis meznombre je 58%. Tiu malgrandiĝo atingis eĉ 65 % koncerne la laborhorojn. Tiuj du ciferoj estas pli malaltaj ol la realaj, ĉar ili kunkalkulas nek la pli grandan kvaliton de l'produktoj, nek la ŝparojn de krudmaterialoj kaj energio.

La konsekvencoj de tiuj fulmorapidaj progresoj,fruktoj de la genio kaj de la laboro de ĉiuj generacioj,devus eksteriĝi per riĉiĝado ĝenerala kaj daŭra de la loĝantaroj. Male, ili okazigas sociajn kaskadajn katastrofojn: antaŭ ĉiam kreskantaj riĉaĵoj, disvastiĝas ĉiam pli granda mizero. Oni eliras el krizo nur por eniri en militon, kaj oni eliras el milito nur por refali en krizon. Oni fine agnoskas, ke tio "ne ronde turniĝas"; necesas kompreni, ke tio neniam "ronde turniĝos", tiel longe dum oni persistos vivi en kapitalisma reĝimo.

## Kiel funkcias kapitalismo

En tiu reĝimo, sin apoganta sur la interŝanĝo, la produktorimedoj estas privataj posedaĵoj. Iliaj posedantoj havigas profiton el ili per la vendado de la produktaĵoj je la plej alta prezo, kiun ebligas la konkurenco. Ankaŭ la personoj, kiuj nenion posedas, vendas sian laboron tiom multekoste, kiom la konkurenco permesas, ĉar la salajroj ebligas al ili aĉeti tion, kion ili bezonas por vivi.

Estas klare, ke tia reĝimo ne povas funkcii kune kun abundo, ĉar ĉi tiu neniigas profiton. Efektive, oni povas vendi nur iavalorajn produktojn aŭ servojn. Nu, la valoro kreskas kun malabundo, kaj malkreskas kun abundo. Superabundaj produktoj havas nenian valoron: oni ilin donus aŭ oni ilin prenus, sed oni ilin ne vendus. Same, superabunda manlaboro ne povas esti utiligata, kaj ĝi rapide fariĝas superabunda, kiam maŝinaro faras la plej grandan parton de tiu laboro.

Do, ŝajna vero estas la aserto, ke abundo ne ekzistas : ĝi neniam ekzistos en kapitalisma reĝimo, ĉar tiu reĝimo estas bazita sur malabundo. Sed abundo estas ebla pro la potencaj produktorimedoj, kiujn oni disponas nun. Kaj ĝuste la ekzisto de ĉi-lastaj ne plu ebligas al la kapitalisman reĝimon funkcii: por konvinkiĝi sufiĉas malmunti ĝian mekanismon.


## Kapitalisma mekanismo

Laŭdire la homaj bezonoj estas senlimaj. Tute vera tio estas, sed la kapitalisma reĝimo pri tio ne zorgas: ĝi konas nur la pagokapablajn (solventajn) bezonojn; tio klariĝas, ĉar la produktisto, elspezinte monon por produkti, estas devigata reenkasigi tiun monon pliigitan de la profito. La kapitalistaj produktistoj zorgas do nur pri klientoj; kaj se ili havus sufiĉe da klientoj por aĉeti kion ili produktas, neniam okazus krizo. Ĝi eksplodas, kiam oni produktas pli ol oni povas vendi.

Ĉar nesolventa bezono estas konsiderata kiel neekzistanta, gravas precizigi, kiel mono alvenas en la poŝon

de la klientoj, ĉar ju pli da ĝi ili posedas, des pli riĉaj ili estas, des pli aĉeti ili povas.

Pri tio ekzistas neniu mistero: en kapitalisma reĝimo, la produktado mem ebligas pagi bezonojn; ĝi kreas ĉiujn klientojn senescepte, per distribuado de enspezoj, per kiuj ili aĉetos la produktojn.




(bildo 2a)

Oni vidas (bildo 2a), ke la produktado, prezentata per la cirklo, naskas senĉesajn pagojn, kiuj direktiĝas laŭ la sagoj 1a,2a,3a,4a,5a,6a. Tiuj pagoj liveras la enspezojn de la laboristoj kaj eĉ tiujn de la ŝtatoficistoj pagatajn per la impostoj (6a). La kapitalistaj profitoj (sagoj 7a kaj 8a) aperas nur se la produktoj estis venditaj laŭ prezo supera al la produktokosto.

Ĉe la bildo 3a, la mono, elirinte antaŭe el la kaso de la produktisto, reeniras en ĝin, alportate de la klientoj, kiam ili aĉetas la produktojn.

La tuta kapitalisma ekonomio resumiĝas esence en tiu duobla operacio: 1e, kreado de produktoj samtempe kun kreado de enspezoj al la klientoj; 2e, vendo de la produktoj al la klientoj interŝanĝe de la enspezoj, kiuj al ili estis liveritaj.




(bildo 3a)

Sed, por ke estu profito, necesas ke en la kason de la produktisto pli da mono eniru ol eliru el ĝi. La plej certa rimedo por tion atingi, estas elspezi kiel eble plej malmulte, kaj la plej bona maniero por efektivigi tion konsistas en la redukto de la produktokosto. Per la stimulo de la konkurenco, ĉiuj produktistoj reduktas la produktokoston kaj esperas per tio pligrandigi sian profiton.

Kiel ili reduktas la produktokoston? Per la nepra uzado de maŝinoj, ili ŝparas manlaboron samtempe multekostan kaj malpli efikan.

Tiel la kapitalismo uzas la progresojn, kiujn efektivigas la teknikoj. Ili utilas unuflanke por pligrandigi la produktadon; aliflanke por malpligrandigi ties elspezojn. Sed ili havas alian konsekvencon: solventigi malpli da konsumantoj.

Do, fatale, krizo okazas ĉiufoje kiam la produktado superas la vendkapablon. La produktistoj tiam plendas pro superproduktado dum la bezonoj de la konsumantoj estas tute ne kontentigitaj.

Ĉiuj krizoj (laŭdire ciklaj) havis tiun saman devenon. Oni likvidis malgajne la stokojn kaj oni kreis novajn entreprenojn tiom longe, dum oni povis esperi ke ili fariĝos profitdonaj: tiam la negocadoj ekkreskadis ĝis nova krizo, kaj la tuta historio de la kapitalismo resumiĝas en sinsekvo de krizoj, kiuj, depost 1880 estas pli kaj pli proksimaj unuj de aliaj.

## La fina krizo (1929)

La unua tutmonda milito akumulis ruinojn kaj elĉerpis ĉiujn stokojn de la planedo. Pro tio oni espere antaŭkalkulis longan periodon de kapitalisma prospero; sed, kiel nun, oni timis mankon de manlaboro dum multe da jaroj. Male, la homa laboro fariĝis pli kaj pli neutila kaj senlaboreco aperis, kaj eksterordinare kreskadis. Baldaŭ la kapitalismaj landoj nombris 30 milionojn da monhelpataj senlaboruloj, kaj ne ĉiujn ili helpis. Supoze ke du personoj ricevas vivtenadon de ĉiu senlaborulo, laŭ la plej modera taksado, cent milionoj da malnovaj klientoj ne plu povis aĉeti.

Intertempe, la krizo de 1929 eksplodis ĉar la produktado, pli kaj pli scienca, multe superis la pagopovajn bezonojn. La falado de la kurzoj ruinigis milojn da privataj entreprenoj, kiuj fermis siajn pordojn, kaj mizero - <u>mizero dum abundo</u> - atingis neantaŭkonatan gravecon. Tiun fojon la krizo estis <u>tutmonda</u> , ĉar ĝi trafis ĉiujn kapitalismajn landojn;ĝi estis ankaŭ <u>ĝenerala</u> , ĉar ĝi difektis ĉiujn ekonomiajn fakojn. Ĉie oni maldungis kaj nenie oni dungis. Ĉie oni plendis pro kreado de ekscesaj konsumotaĵoj, sur kamparo kaj ankaŭ en urboj. La magazenoj estis superplenaj je varoj sed malplenaj de klientoj: <u>la senokupiteco de la laboristoj sekvigis tiun de la mastroj, ĉar kiu ne povas aĉeti, ruinigas tiun, kiu ne povas vendi</u>.

## Enmiksiĝo de la ŝtato

Laŭ difino, kapitalistoj malamas la ŝtaton, kiu, ili diras, paralizas la entreprenemon, la fruktodonajn iniciatojn,ktp. Sed, ekde la sveno de profito kaj la apero de malgajnoj, la produktistoj sin turnas al la ŝtato por havigi al si protektadon, kreditojn kaj mendojn.

Ĉeestante antaŭ, unuflanke, stokoj da varoj nevendeblaj, aliflanke, nesatigitaj bezonoj, kion faris la kapitalisma ŝtato? Ĝi povus aĉeti la varojn kaj ilin donaci al la senlaboruloj, kiuj ne kapablas ilin aĉeti nur tial ke ilia laboro ne necesas por ilin pro-

dukti. Tiu humana solvo ne estas kapitalisma. La ŝtato do aĉetis la varojn kaj ilin detruis, pretekstante "sanigi la merkatojn". La impostpagantoj tiel pagis senutile la varojn, kiujn ili ne povis aĉeti.

Estus tro longe tutciti la leĝajn detruadojn de tritiko, maizo, fiŝoj, viando, vino, lakto, kafo (en Brazilio 100 milionoj da 60-kilogramaj sakoj), de kotono, legomoj, fruktoj, teo, ktp., samkiel ankaŭ indiki la leĝajn rimedojn elektitajn por malpligrandigi la estontan produktadon. En Usono, la registaro elspezis kompensojn tiel altajn, ke multaj agrikulturistoj gajnis pli da mono kruĉante la brakojn ol prisemante siajn bienojn.

## Restarigo de la profito per fabrikado de armilaroj

La "sanigado" de merkatoj kaj la laŭleĝaj limigoj de produktado montris sian nekapablon haltigi la katastrofan faladon de l'profito. Por sukcesi, necesus tre ege pligrandigi la ciferon de profitvendoj; tio eblas nur se la nombro da klientoj kreskas, aŭ se iliaj enspezoj pligrandiĝas.

Sub kapitalisma reĝimo, la produktado mem kreas klientaron; do necesis eltrovi iun eksterordinaran produktadon, kiu povus krei salajrojn kaj profitojn same kiel ĉiuj kapitalismaj produktadoj, sed kiu precipe kunportus neniun vendotan varon en la jam supersaturitajn merkatojn.

Sen interkonsiliĝo,la kapitalismaj nacioj malkovris, ke rearmigoj plenumas ambaŭ kondiĉojn, kaj ili ekfabrikis armilojn laŭ ĉiam akcelata ritmo. Rearmigoj ebligas disdoni mendojn al ĉiuj fakoj: metalurgio, ŝipkonstruado, publikaj konstruentreprenoj, teksado, fabrikado de ĥemiaĵoj, de nutraĵoj, ktp. Dekiam ambaŭ seksoj estis enregimentigitaj en kolosajn modernajn armeojn, la pormilitaj necesaĵoj ampleksiĝas de kirasŝipo al mamsubtenilo. La ŝtato povas aĉeti tiom da krudmaterialoj, kiom ĝi deziras: sufiĉas, ke ĝi asertu la urĝecon starigi rezervstokojn necesegajn por la "Defendo de la Nacio".

Mendoj de armiloj baldaŭ kreskas laŭ kapturna ritmo en ĉiuj kapitalismaj landoj. Ili atingis la egan sumon de 8 200 miliardoj da francaj frankoj, dum oni ne trovis unu por la pensio de la maljunaj laboristoj. De 1936 ĝis 1938, budĝetaj elspezoj por preparado de milito duobliĝis en la mondo. Sed spite al la rapida ampleksigo de pormilitaj instruejoj, ankoraŭ restis senlaboruloj.

## Tiam aperas faŝismo

Nenio pli bone priskribas la situacion en Germanio, ol tiu parto de artikolo en la franca gazeto "L'Illustration" (La Ilustraĵo) de 21.Nov.1931,kie S-ro Gujelmo Ferrero rekopias la deklaracion de germana urbegestro: "Dum la tuta milito (1914/18), mi estis komisiita por dispartigi la disponeblajn nutraĵojn inter la popolo de ĉi tiu urbo. Tio estis peniga tasko, ĉar mi disponis nesufiĉajn kvantojn, eĉ por limigita konsumado. Sed mia funkcio estas nun ankoraŭ pli peniga: en ĉi tiu urbo magazenoj estas superplenaj je karbo, tritiko, kafo, sukero, tukoj, por kiuj oni ne trovas aĉetantojn. Estas miloj da malplenaj ĉambroj, kiuj vane atendas luprenantojn kaj estas ankaŭ dekmiloj da senhejmaj, malsataj viroj kaj virinoj, kiuj estos post kelkaj semajnoj frostiĝintaj. Nu, mi povas fari nenion por ili."

Ĉar Germanio entenis pli ol 6 milionojn da senlaboruloj, Hitler sukcesis trudi sian nacisocialismon. Li publike malkaŝis malbonagojn de Judoj, de framasonoj, de la packontrakto de Versajlo (Versailles) kaj de demokratioj. Laŭ Hitler, ili estis la respondeculoj de ĉi tiu situacio, tamen tutmonda. Li promesis al germanaj senlaboruloj laboron kaj vivspacon, kaj rapide ekfabrikigis al ili armilarojn, kies valoro fine atingis 90 miliardojn da markoj.

<u>Faŝismo ja estas la aŭtoritata formo, kiun kapitalismo prenas kiam ĝiaj risortoj estas rompitaj</u>. Ĝi ankoraŭ volas funkciigi ilin bone malbone per fera trudpremo; forigo de politikaj partioj kaj kreado de registara unika partio; forigo de preslibero kaj kreado de oficiala informilaro, organo de la ŝtatpovo; forigo de

sindikata libero, sed restarigo de antikvaj fermitaj korporacioj; superregado de privataj monopoloj; ŝparado de ŝtalo; kreado de laborkampoj kaj militinstruejoj; plifortigo de ŝtata polico kaj starigo de koncentrejoj. Por ŝajnigi helpon al mizeruloj, la ŝtato prezentas sian kaskon sub militmuziko. Dek du mil ekzekutoj estis necesaj por firmigi la triumfon de la nova ordo en Germanio.

Ankaŭ per la ekspluatado de la mizero en industriaj centroj de Norda Italio, Musolini sukcesis sian marŝadon al Romo. En kiu lando kapitalisma oni ne malkovris pli malpli kaŝitajn faŝismajn tendencojn?

## Sed, kiu pagis la restarigon de l'profito?

La mono. Sub kapitalisma reĝimo mono estas varo simila al aliaj varoj. Sed, ĉar oni akceptas ĝin kompense de aliaj varoj kaj servoj, ĝia valoro devas esti konstanta. Nu, la valoro de iu varo kreskas kun malabundo kaj malkreskas kun abundo. Estas evidente, ke kapitalismaj nacioj ne povis ekvilibrigi la astronomie grandajn elspezojn por armiloj per enspezoj de impostoj kaj monpruntoj. De antaŭ dudeko da jaroj, ilia budĝeto estas deficita. Deficito kreskas ĉiujare, tial ke ĉi tiu deficito kreas parton de la enspezoj, kiujn libera produktado ne plu kreas. La ŝtato, kiu nepre devas pligrandigi senĉese siajn monrimedojn, devas plimultigi monbiletojn. Tia inflacio, superproporcie al la plimultigo de utiligeblaj varoj forkonsumas aŭtomate la kapitalisman monon.

En 1914, en Francio, cirkuladis proksimume 10 miliardoj da frankoj (duono laŭ valoro de l'metalo, duono laŭ biletoj garantiataj de la Banko de Francio). Cirkuladas nun 589 miliardoj da frankoj: preskaŭ sesdekoble. Oni do povas kompreni, kial la valoro de l'franca franko spertis malaltiĝon, kiun oni povas mezuri laŭ la altiĝo de la prezoj de la produktoj kaj de la servoj, kiujn tiel oni povas akiri.

Sed, de 1929, ĉiuj kapitalismaj monoj senescepte spertis unu aŭ plurajn devalutojn. Oni kutime supozas, ke la usona dolaro, brita funto, svisa franko, nederlanda guldeno estas rifuĝmonoj. Ili ne tiel malaltiĝis, kiel la

franca franko, sed iras laŭ la sama vojo; ĉar la kaŭzoj, kiuj malfortigas la francan frankon, difektas tiel certe ankaŭ alilandajn monojn pro la nuna neeblеco por kapitalismo ie vivi.

Devaluto pligravigas la sociajn malordojn, kaj svenigas ŝparmonon. Ĝi ruinigas ĉiujn, kiuj ricevas fiksitan renton, precipe maljunajn ekslaboristojn.

## M i l i t o   e b l i g i s   e f e k t i v i g i   n o v a j n   t e k n i k a j n   p r o g r e s o j n

Tiel freneza konkurado pri armiloj nepre devis finiĝi per milito, ĉar milito ebligas fabriki ankoraŭ pli da armiloj. La nura Usono dediĉis 160 miliardojn da dolaroj (1946a valoro) tiom por siaj armeoj, kiom por la armeoj de siaj aliancanoj. Spite la mobilizadon de 12 milionoj da viroj kaj virinoj, la produktado de konsumotaĵoj kreskadis dum la milito, sed ankoraŭ restis senlaboruloj. La produktado impetis tra la tuta mondo.
La aliancanoj fabrikadis pli da ŝipoj ol oni subakvigis, pli da aviadiloj ol oni faligis, pli da tankoj ol oni detruis: tio ne plu estas sekreto. Jam antaŭ la milito, oni bedaŭris abundecon de kaŭĉuko, nun oni fabrikas pli ol 1 600 mil tunojn da sinteza kaŭĉuko, do tio estas pli granda kvanto ol kulturejoj liveris. Sintezaj teksaĵoj disvastiĝis eksterordinare. Anstataŭigante la mekanikan fabrikadon per la muldado de la plastaj materialoj, oni realigas gravan ŝparon de laboro. Senmanlaboran procedon oni adoptis en la magnezia industrio. Oni nun eltiras el marakvo grandajn kvantojn da bromo kaj potaso.

La subtera gasigo de karbo, inaŭgurita en Rusio, efektivigas minejon sen ministoj. Ĝi povas produkti gravegajn amasojn da gaso, kiujn oni povas uzi por sintezoj de formaldehido, alkoholoj, amoniako, nitracido, sintezaj oleoj, ktp.

Maŝinoj povas liberigi la homon de ĝia laboro per la limigo de ĝia rolo je tiu de kontrolisto; eĉ ĉi-lastan funkcion oni povas forigi per elektronaj teknikoj. Tute aŭtomataj fabrikoj estas nun eblaj. (Parolado de Luciano Peruŝ - Perruche).

Fine, atoma energio...

## Kaj morgaŭ?

Antaŭ la milito, oni ordonis limigadon de produktado, morgaŭ oni ordonos plivastigi ĝin; sed oni rapide revenos en la saman senelirejon, ĉar la situacio pligraviĝos. Efektive, rekonstruado, finance nesolvebla problemo sub kapitalisma reĝimo, neniel ekrealiĝos.

La kapitalismaj landoj estas certaj konstante havi produktopovon superan al vendopovo pro la vaniĝanta malaperigo de aĉetpovo. Ju pli da varoj en butikoj, des malpli da klientoj la butikoj ricevos.

Ĉu sensenca krizo de superproduktado aperanta dum periodo de malabundo okazigus malaltigegon de la prezoj ? Tiam ni ĉeestus novajn kaskadojn de bankrotoj, kiuj tute diserigus tion restantan, kaj disfalon de la libera ekonomio. Oni ĉie refabrikados armilojn (tiutempe kadukajn), la budĝeta deficito ekkreskos, kaj ĝiaj konsekvencoj aperos: falo de l'mono kaj elsveno de ŝparmono.

La popolo dispartiĝos en du klasojn (4a bildo) : unu al kiu la kapitalisma produktado liveros ĉiam pli etajn dube sekurajn enspezojn; la alia kunigos konfuze senlaborulojn, senmetiajn junulojn, ruinigitajn mastrojn, senrentajn maljunulojn, kaj la sorto de la unua klaso pli malpli rapide kunfandiĝos en la dua.

DU KLASOJ

| Klaso de produkto | Klaso de mizero |
|---|---|
| Homoj, kiuj ankoraŭ havas laboron | Senlaboruloj kaj ties familioj |
| Mastroj,kiuj ankoraŭ ricevas profiton | Senmetiaj junuloj |
| Rentuloj,kiuj ankoraŭ ricevas rentojn | Senrentaj maljunuloj |
| | Ruinigitaj mastroj |
| Sume, ĉiuj, al kiu la produktado ankoraŭ liveras enspezojn | Resume, ĉiuj, kiujn la produktado ne plu bezonas |

(4a bildo)

Viroj kaj virinoj, esperante eviti mizeron, rifuĝos en armeon kaj ŝtatoficojn: tio pezigos la budĝeton kaj

kreos novajn barojn al liberala ekonomio, kiu pli kaj pli identiĝos kun nigra merkato.

Kiam oni bezonas pli kaj pli da mono por vivi pli kaj pli malbone, malmoraleco enradikiĝas, la disruiniĝo de l'reĝimo rapide fariĝos tiel grava, ke faŝismo ŝajnos savrimedo.

Loga iluzio! Faŝismo povas fari ĉion...escepte krei klientojn, kiujn kapitalismo bezonas por superakviĝi.

## Distribua ekonomio

Ĝi fariĝas nepre necesa, kiam, post ekipado de lando ĝis alta teknika grado, la produktado ne plu postulas la samtempan laboradon de ĉiuj laboristoj.

Por ke ĉiuj ricevu laboron, necesas ke homoj laboru dum malpli longa tempo kaj laŭvice. Senlaboreco, dispartigita same kiel laboro, malaperas kaj fariĝas libertempo por ĉiuj.

Por ke estu ankaŭ produktoj por ĉiuj, la rajto ricevi fabrikaĵojn devas esti malkunigita de la kalkulado de la farita laboro. La formulo de distribuado de riĉaĵoj estas : "Al ĉiu laŭ ties bezonoj", ĉar la formulo "Al ĉiu laŭ ties laboro" estas kaduka,tial ke interŝanĝoj fariĝas pli kaj pli malfacilaj.

El tio rezultas fundamentaj reformoj de strukturo:

1)la produktorimedoj, reposeditaj de la kolektivo, funkcias por satigi la realajn bezonojn de l'konsumantoj;
2) la laboristoj laŭvice liveras "socian servon" por certigi la daŭrigadon de l'produktado;
3) la distribuado de riĉaĵoj efektiviĝas pere de "mono de konsumado", kies nura celo estas transdoni la produktojn al la konsumantoj.

Tio rezultigas la jenajn konsekvencojn:

1)la sociaj klasoj malaperas, ĉar ili kunfandiĝas dum la socia servo . Ekspluatado de homo far alia homo estas de tiam neebla.
2)la ŝtato tute transformiĝas. Sub kapitalisma ekonomio, ĝi devas arbitracii konfliktojn inter sociaj klasoj, sed fakte ĝi defendas la interesojn de la

plej potenca klaso kaj plenumas neniun ekonomian oficon. En distribua ekonomio, la ŝtato fariĝas utilcela, plenumas ĉiujn ekonomiajn funkciojn, ne plu devas arbitracii konfliktojn, tial ke klasoj ne plu ekzistas:regado de homoj estas anstataŭita de organizado de aĵoj. La ŝtato garantias al ĉiuj, kiuj vivas en sia sino: edukadon, instruadon, materialan komforton, estontan sekurecon. Ĝi certigas al ĉiuj tiun liberon pri pensado, pri agado kaj parolado, kiu estas efektiva nur al tiuj , kies materiala sekureco estas garantiata.

3) la produktado estas science planita, sed la plano estas definitive fiksita de la politika povo, kiu devenas de la tuta nacio.

4) la socia servo utiligas plej bone la kapablojn de ĉiu homo. Ĝi daŭras laŭ la grado de ekipado kaj laŭ la produktofako al kiu ĝi rilatas.

5) ĉiu homo rajtas ricevi ekde sia naskiĝo ĝis sia morto socian kaj dumvivan renton, kiu post efektiviĝo de abundo estos egala por ĉiuj. Sen ekonomia egaleco, demokratio estas nur tromplogilo.

6) ĉiu rajtas elspezi sian renton laŭ sia plaĉo. Oni kalkulas ĝin tiamaniere, ke la sumo de ĉiuj rentoj egalas la tutan valoron de produktoj kaj servoj fiksitaj laŭ la plano. Tuj kiam la ŝtato certigas al ĉiuj renton, ne plu estas impostoj. Tiu rento estas pagata per "mono de konsumado", kiu egalvaloras la produktojn distribuotajn.

7) Distribua ekonomio tiel ebligas plenan disvolviĝon de l'individuo. Ĉiuj cerboj estas klerigataj ĝis la aĝo de l'socia servo. Post la socia servo, ĉiu homo estos liberigita de ĉiu materiala zorgo kaj povos ebligi al sia familio konvene vivi kaj dediĉi sin al iu laŭplaĉa okupiĝo. Libertempo, konkeraĵo de scienculoj kaj per la laboro de ĉiuj antaŭaj generacioj, estas atingebla de ĉiuj homoj. Ĉar civilizacio estas filino de libertempo, kion oni ne povas esperi de socio, en kiu ĉiu estas edukita kaj ĝuas feliĉan libertempon ?

## S i g n i f o   d e   l a   n u n a   r e v o l u c i o

Neutilas serĉi antaŭajn similaĵojn en la historio : ili ne ekzistas. Aĵoj estas revoluciemaj: la homoj ankoraŭ ne estas tiaj.

Karl Marks ĝuste rimarkis, ke "la maniero, laŭ kiu homoj distribuas riĉaĵojn inter si, ne estas konstanta. Ĝi varias kun la modo laŭ kiu ili dispartigas laboron inter si". Kiam tiu modo ŝanĝiĝas, homoj fine adaptiĝas, kaj tiu adaptiĝo - ĉiam revoluciema , ĉar ĝi modifas la starigitan ordon - neprigas fortotrudon, kiam estas venkotaj kontraŭfortoj. Resume, la sociaj klasoj - konsekvenco de malabundo - interdisputadas pri la posedo de produktorimedoj, kiuj donas riĉon kaj potencon laŭ ekonomio bazita sur interŝanĝoj. Tiel,la franca revolucio de 1789 obligis al la burĝaro abrupte finkonkeri la posedon de produktorimedoj (precipe tero) kiuj apartenis al nobelaro kaj pastraro.

La nuna revolucio havas tute malsaman esencon: sub la influo de eksterordinaraj teknikaj progresoj, la produktorimedoj ne plu estas profitdonaj; ili falas el la manoj de siaj posedantoj, ĉar la profito - kiu prav igis ilian alproprigon - estas malaperanta. Tiu posedrajto donis la kapablon uzi kaj misuzi posedaĵojn. Nu, ne nur estas malpermesate misuzi, sed la uzrajto estas reduktita je 90 % per leĝoj kaj reguloj dum ĉi-lastaj jaroj. Tiu limigo ekzistas en ĉiuj kapitalismaj landoj pro la nura trudo de okazaĵoj: oni povas diri, ke neniu frakcio de ĉi tiuj 90 % povas esti konsiderata kiel venko de iu politika partio.

El tio rezultas, ke la nun okazanta revolucio ne profitas al iu speciala klaso, ĉar neniu klaso nun povas eltiri profiton el la posedo de produktorimedoj. Se morgaŭ la proletaro ekposedus ilin, la produktorimedoj estus al ĝi neutilaj, same kiel ili estus neutilaj al la nobelaro kaj eklezio, se ili reakirus ilin el la burĝaro.

Ne plu temas preni al iuj por doni al aliuj, sed pliriĉigi ĉiujn.

Do la antikvaj revoluciaj taktikoj estas nun kadukaj. La defendo de privilegioj ja fariĝas neebla, ĉar la kreditoroj mem prenas sur sin la likvidon de deficitaj entreprenoj.

La nun okazanta revolucio ankaŭ ne estas komparebla kun la bolŝevista revolucio de 1917, ĉar tiam la cara Rusio posedis nur elementan ekipadon kaj kamparanaron,

kiu apenaŭ elservutiĝis. Spite al la miregigaj efektivigoj de siaj kvinjaraj planoj, Sovetio ankoraŭ ne posedas la potencan ekipaĵaron, kiun postulas distribua ekonomio. Ekzistas en tiu lando laboro por ĉiuj, kiuj bezonas ĝin por vivi. Sed tuj kiam tiu laboro atingos altan produktivecon, Sovetio ĝuos abundon (parolado de Stalin al Staĥanovistoj, la 17an de novembro 1935). Tio okazos multe pli frue, ol oni komune opinias.

Fine, la nuna revolucio estas tutmonda. Kvankam ĉiuj popoloj estas solidaraj, la agonianta kapitalismo nun kondamnas ilin al aparta, sendependa vivo. La kaŭzo estas, ke la ekonomia ekvilibro de la 19a jarcento, bazita sur la suplementaj interŝanĝoj de industria Eŭropo kun ekstereŭropa mondo liveranta krudmaterialojn, estas definitive rompita. Efektive, ekipado de novaj landoj estis profitdona afero por kapitalistoj; nu, ĉar lando pagas siajn importaĵojn per siaj eksportaĵoj, la nacioj kiuj bezonas importi ne plu povas eksporti. Pro tio la landoj, kiuj ne plu bezonas importi ne plu povas eksporti. Tial la internacia komerco haltiĝas.

Ĉio trudas al la nacioj konstruadon de "Tutmonda Ŝtato" super politikaj kaj doganaj limoj, kiuj ne plu havas ekzistokialon. Jam en kelkaj internaciaj konferencoj oni zorgis pri kolektiva sekureco, pri la ebleco por ĉiuj ricevi krudmaterialojn, pri internacia Kortumo ktp. Francio insiste petis en Dumbarton Oaks internacian organizaĵon pri Publika Sano, ktp.

Tiuj institucioj devos esti kreitaj kaj unuigataj.

J. D. 15.1.1946

.---==o==---.

# M O V A D O  F R A N C A
# p r i  A B U N D O

La celo de la Movado Franca pri Abundo (M.F.A) estas:

1) Komprenigi la kompletan transformadon, kiun la homaj sociój spertas por adaptiĝi al la miregigaj progresoj de tekniko.
2) Proponi ĉiun rimedon ebligantan la akcelon de tiu evoluo tiamaniere ke ĝi ne okazigu pli da mizero kaj perforto, ĉar kleruloj juĝas ilin bedaŭrindaj kaj tute ne utilaj.

Ĝi ankaŭ klarigas al kontraŭfaŝistoj, ke la nura rimedo por renversi definitive faŝismon, estas renversi la kapitalismon mem.

M.F.A. provas kutimigi siajn samtempanojn rigardi transe de kapitalismo, ĉar, por tro da homoj, estas nepre la ruiniĝo aŭ eĉ nur la kazernvivo kun komuna popola manĝado.

M.F.A. ne estas eklezia movado.

M.F.A. estas nepolitika, ĉar ĉiuj politikaj partioj defendas, sub kapitalisma reĝimo, la profitojn de la klaso, kiun ili reprezentas. Antaŭ la milito ĉiuj partioj voĉdonis favore al la detruado de varoj kaj limigado de la produktado; nun, ili ĉiuj akceptis la kontrakton de Bretton Woods (Bretonŭudz) por la konservado de mono bazita sur oro, do por kapitalismo.

M.F.A. estas nepolitika, ĉar ĉiu partio devas fari kompromisojn kun aliaj partioj; nu, M.F.A. insiste petas distribuan ekonomion aŭ nenion.

Sed, se M.F.A. nepre staras ekster partioj, ĝi tute ne estas malamika al ili, male, ĝi invitas siajn anojn aktive propagandi en la partio, kiun ili elektis por atentigi ĝin pri la mekanikeca revolucio, pri kiu ankoraŭ neniu atentas. Ili nepre ekvidos iam, ke iliaj programoj estas kadukaj.

M.F.A. ne petas sociajn plibonigojn realigeblajn post 30 jaroj, sed pruvas, ke oni povus tuj, senprokraste, efektivigi ilin, se la homoj ekkomprenus, ke tritikogreno entenas pli da riĉaĵoj, ol la tuta oro de l' mondo. Tamen, se homoj estas viktimoj de siaj antaŭjuĝoj, ne rezultas de tio, ke reformoj de strukturo estas

prokrasteblaj ĝis la tempo, kiam ili komprenos:rapida ago taŭgas se oni deziras, ke la malgranda restanta parto de civilizacio ne enabismiĝu en nepriskribeblan ĥaoson.

M.F.A. batalas kontraŭ ĉiuj troigoj: libera ĉerpado de varoj, unuhora labortago, ktp.

M.F.A. studas pri la multegaj necesaj reformoj pri moraleco, edukado, instruado, leĝfarado, higieno publika, organizado de libertempo,ktp, sed opinias, ke ili estas efektivigeblaj nur post la starigo de distribua ekonomio. Ekonomia reformo laŭ ĝi superas ĉiujn aliajn, ĉar ĝi estas nepraĵo por realigi ilin.

Se M.F.A. scias, ke distribua ekonomio ne ekŝprucos kvazaŭ sorĉe, ĝi ne pensas, ke laŭgrada reforma plano efikus, ĉar tio postulus halton de sciencaj progresoj. Sed M.F.A. prezentas transirajn ŝtupojn. Simile al la transformado de fervoja stacio, kiu devas esti realigita sen interrompo de l'trafiko, la pasado al Distribua Ekonomio devus realiĝi sen abruptaj ŝanĝegoj en la vivo de ĉiu homo, kaj precipe sen halto de la produktado.

Konsekvence, M.F.A. insiste petas, ke ekonomio estu porabundema, kaj <u>ne kontraŭabundema</u>, kia ĝi nun estas.

Sed tiu kompleta ŝanĝo en la politika orientado estas ebla nur se produktistoj estas certaj disvendi siajn stokojn da varoj tuj kiam ili reamasiĝos.

Tial, oni devas pligrandigi la aĉetpovon de l'konsumantoj per la ekuzado de <u>mono de konsumado</u>, nura rimedo por kompensi la netaŭgecon de la kapitalisma mono, ĉar tio ebligus stabiligi la prezojn.

Fine, M.F.A. postulas la proklamadon de la <u>ekonomiaj rajtoj de la homo</u>.

-:-

Gérant & imprimeur: C.Baudé,47 -Laroque
Commission paritaire de presse n° 39 863

P.V. B E R T H I E R

# alveno
d e
# abundo
k a j
# konsumsocio

.---===o===---.

Kun la permeso de l'aŭtoro
elfrancigis kaj eldonis la
Abundana Frakcio de SAT
en la suplementa serio

de

La Juna Penso - F 47340 Laroque-Timbaut

# ALVENO de ABUNDO
## kaj
## KONSUMSOCIO

Antaŭ nur kvardeko da jaroj, nemulte da homoj posedis banĉambron. Estis luksaĵo. Tiuj, kiuj havis ĝin, ĝenerale estis personoj, kiuj ne malpurigis sin. Ju pli naŭzan metion oni praktikis, des malpli oni disponis tion necesan por sin lavi. Sur tiu kampo realiĝis granda progreso: hodiaŭ multaj civitanoj posedas banujon, oni ne plu konstruas domojn senajn je ĝi, kaj la lokoj, kie okazas malpuriga laboro, estas preskaŭ ĉiam ekipitaj per instaloj, kie la laboristo povas sin purigi antaŭ ol rehejmeniri.

Oni povis diri, kaj estas vere, ke la princoj ne tiom havis en Versajlo.

Tiu ŝanĝo havas du kaŭzojn. La unua estas la depostulado. La homoj lernis grupiĝi en sindikatoj por postuli sian justan parton el la de ili kreitaj riĉaĵoj, kiujn ja tro malegala dispartigo maldomaĝis al privilegiita malplimulto: spoliado, kiun oni longe konsideris neprega.

Ili povis obteni sanitaran ekipaĵaron en la laborejoj, kaj ankaŭ pli altajn salajrojn ebligantajn al ili akiri artiklojn antaŭe tro kostajn por sia monujo.

La alia kaŭzo estas la akceliĝo de l'teknikoj, kiuj ebligas fabriki mil banujojn tiel rapide kiel antaŭe oni fabrikis nur unu, kaj igi tute ordinara objekton antaŭe raran.

Ni ne volas etigi la rolon de la depostulado en tiu procezo, ĉar ĝi inspiris heroaĵojn kaj estis la armilo de la malriĉulaj rajtoj kaj digno. Tamen necesas agnoski, ke ĝia efiko estis relative limigita. Fakte, depostulado ne kreas tion mankantan, eltiras nenion el la neesto. Ĝi nur esprimas - ne pli - rajtan deziregon. Apenaŭ ĝi povis denunci la maljuston, laŭ kiu banujon posedis nur tiuj, kiuj malpli bezonis ĝin; nu, ŝajnas, ke ĝi sukcesis nek modifi tiun bedaŭrindan situacion nek ripari ties maljustecon.

Male, kiam la laùseria fabrikado anstataùis la unuopan fabrikadon per la transiro de la metiistaj al la industriaj labormetodoj, tiam la multiĝo de banujoj realigis kion la nura depostulado ne kapablus fari: ĝi metis la banujon trafebla de la popolo, se ankoraù ne de ĉiuj.

Tio certe ne okazis en unu tago, ĉar ne temas pri mirrakonto, sed laù regula kaj normala progresado, kiu aktuale disvolviĝas en la evoluintaj landoj kaj kiu pluiros planedskale ĝis sia tutfino.

Ni elektis ekzemplon pri banujo, tial ke laù la modernaj konceptoj pri komforto kaj higieno oni vere konsideras ĝin necesaĵo. Sed se ni elektus tiun pri la aùtomobilo, la demonstro estus ankoraù pli konvinka, kaj ni povus tute prisilenti la depostuladon kiel ŝanĝo-faktoron.

Fakte, neniam la laboristaro postulis posedi privatan veturilon por siaj propraj vojaĝetoj en epoko kiam posedis kaleŝojn nur la nobeluloj kaj la grandburĝaro,krome kelkaj komediistoj kaj elegantaj publikulinoj.

Neniam la laboristo insiste petis sian veturilon : la socio - la burĝa industria socio - donis ĝin al li sen lia peto. Kial ? Pro la invento kaj poste la multiĝo de l'aùtomobilo. (1)

Oni notu,ke rilate aùtojn, la socialista industria socio estis multe malpli malavara ol la burĝa: la privata veturilo multe malpli disvastiĝis en ŝtatekonomiaj landoj ol sub la privatekonomiaj reĝimoj.

Ankaù la plialtiĝo de l' salajroj estis frukto samtempe de la depostulado kaj de la teknika progreso. Ne eblas nei, ke tiu plialtiĝo ankoraù ne sufiĉas, sed tutsame ne eblas nei, ke la plimulto el la homoj enspezas pli ol antaùe (mi ĉiam aludas pri la industrie evoluintaj landoj). Sendube, depostulado pri tio iom respondecas; sendube, la sindikata agado, eĉ la politika, ludis gravan rolon en la plibonigo de l'viv nivelo.Sed tio estas nur parta kialo de l'fenomeno.

Efektive, kiam la produktaro estis rara, la salajroj estis etaj, kaj la plej granda parto de la malmultaj kreitaj produktoj alfalis nur al la posedanta

klaso, ĉar tiu ĉi rezervis al si, en la dispartigo, la plej bonajn akir-eblecojn.

Sed ekde kiam la teknika progreso faciligis abundan, poste superabundan produktadon, tiam nepre necesis, ke la posedantoj de l'rimedoj de tiu produktado - kiun ili solaj ne sukcesus resorbi per sia akaparado - konsentu pli altajn salajrojn al sia dungitaro, al la klaso hieraŭ ja tute proleta. Se ne,la produktaro restus nevendebla kaj ili mem elsekigus la fonton de siaj profitoj.

Oni scias, ke la ĉefa ekapliko de altaj salajroj okazis ĝuste en la aŭto-fako, ĉe Ford, firmao, kiu longe famis pro siaj taĉmentoj da strikrompaj banditoj.

La burĝaj ekonomikistoj subite returniĝis. Ĝis tiam ilia doktrino asertis: "Ju pli da mono havas la entrepreno kaj ĝia estro,des pli bone fartas la aferoj; nu , ju malpli da ĝi ili donas al la laboristo, tiom pli restas al ili; do, ju pli malaltaj la salajroj, des pli glate tio funkcias."

Tiun veron de la tempoj de malabundo anstataŭis tiu alia de la erao de abundo: "Ju pli ni produktas kaj vendas,des pli grandaj la profitoj; por akceli la ritmon kaj la disvendadon de tio produktita, necesas ke tio ĉi rapide elĉerpiĝu, do ke estu multe da disponebla mono ĉe la akirontoj; por ke tiuj havu multe da mono, pli da oni donu al ili; sekve,ju pli altaj la salajroj,des pli kreskos la produktado kaj la profitoj."

Tiu doktrin-ŝanĝiĝo, trudita de l' faktoj, fatale ion modifis, se ne en la esence egoista mensostato de la posedantoj de l'produkt-rimedoj, almenaŭ en la rilatoj inter ili kaj iliaj dungitaroj kaj en la rezulto de salajraj depostuloj, kiujn pravigis ne plu nur la bezonoj de la postulantoj sed ankaŭ la intereso de tiuj, al kiuj oni prezentis ilin. Nerekte, kreiĝis inter la antagonismaj klasoj komuna intereso por ke malriĉeco malaperu.

De depostulo sen la abundo ĉiam rezultis nur malgravaj venkoj, etaj gajnoj eltiritaj per pezaj oferoj kaj rapide reprenitaj de la riĉuloj, kiuj konsentis ilin. Eĉ la socia revolucio, se realigita en malriĉa lando , povus nur la mizeron justece dispartigi.

Siaflanke , la abundo sen depostulado povas komence havi kiel konsekvencon pletoran riĉiĝon de malplimulto, kiun la granda amaso rigardas glutaĉi kaj supersatiĝi. Sed tiu stadio estas mallonga,ĉar tiu plenŝtopita malplimulto ne povus senfine ĝui sola la nekalkuleblan nombron da produktaĵoj, nek precipe certigi per nur siaj elspezoj la mon-rotacion necesan al la funkciado de l'ekonomio, t.e. al sia propra prospero.

Ekzistas ja, en la emirlandoj de la Persa Golfo, lokaj potenculoj,kies plezuro estas veturigi sen pasaĝeroj siajn centojn da luksaj aŭtoj sub la okuloj de siaj ĉifonvestitaj kaj imponitaj regatoj.Sed tiu pitoreska skandalo ekmalaperas nun.

Oni povas aserti ke, eĉ sen la depostulado, la teknika progreso garantius progresivan plialtiĝon de la socia kondiĉo kaj ĝeneraliĝon de l' komforto. Profitas al tiuj mem, kiuj grasiĝas per la fabrikado de lavmaŝinoj aŭ televidiloj, ke la plej malriĉaj familioj povas ilin aĉeti. Tamen, la konkurenco en la privata ekonomio estas tiel ordona,tiel senkompata faktoro, ke pro tio la mastroj ne fariĝis pli malavaraj:

Kvankam agnoskante la neceson,por sia intereso mem, ke la tuta popolo gajnu multe por ke iliaj brokantaĵoj forvendiĝu kaj donu al ili bonegajn profitojn, ĉiu aparta mastro plejeble reduktas la salajron de sia dungitaro, lasante al siaj samrangulej - kiuj rezonas same kiel li ! - la zorgon altigi la salajron de la propraj laboristoj...

Tial la depostulado tiam retrovas sian gravecon kaj sian rolon: kolektive postulante laborpagon,kiu ebligu justan kaj tujan distribuadon de la produktaĵoj, ĝi akcelas la pliiĝon de l' bonstato kaj samtempe favoras regulan funkciadon aŭ reviglliĝon de l'ekonomio.

Sume, tio pruvas, ke la nunaj depostulantoj estas alvokitaj por fariĝi morgaŭ la kooperaj distribuantoj en sistemo kie la produkt-rimedoj estos forprenitaj al la superregado de l'kapitalo. Dedukto, kiu tutspontane identiĝas kun la tezo anarki-sindikata.

o o
o

Lasite al si mem kaj al sia propra impulso,la teknika progreso estas libera pulio,kiu turniĝadas blinde. La homo ne povas lasi tiun forton sen kontrolo ; tial necesas planoj.

Fakte, se nenio bremsos, ekzemple la produktadon de fridoŝrankoj en lando,kie oni bezonas dek milionojn, kaj kiu jam stokas cent milionojn da ili, kvankam tie maksimume kvincent mil personoj posedas la monrimedojn por aĉeti po unu, tiam tiu produktiva frenezo senĉese kreskados, kaj baldaŭ estos unu miliardo da fridujoj ŝimantaj en staplejoj.

Certe, intertempe,ties supermezura multiĝo malaltigos la prezon, dank'al kio kvin milionoj da personoj povos aĉeti po unu kaj multaj fabrikistoj bankrotos, restos nur kelkaj, de nun mastroj de l'merkato, de l' dungado kaj de l'prezoj.

Sed ĝuste tiu monopolo donos al ili - krom ekonomiaj respondecoj - ĝeneralan vidon super la situacio, kiun ili povos regi, nur aplikante la nepre necesajn planojn sugestitajn de la teknikistoj.

Ni atingis tion, t.e.tiun kontestitan kaj malestimigitan aspekton de la socio de abundo nomita "konsum-socio" :

Kio estas la konsum-socio ? Ĝi estas la socio de abundo, kiun difektas kaj falsas la malperfektaĵoj esence propraj al la ekonomio de profito.

Ni scias, ke la konsumsocio, eĉ kun ties ekscesoj, estas preferinda al la socio de malabundo, kiun ni konis.Sed ni tamen konsentas kun la klarvida parto de la aganta junularo, ke necesas forigi tiujn ekscesojn, kies ekzisto ne mirigu nin, ĉar ilin ni heredis de la socio de malabundo, kiu lasis ĉe siaj samtempanoj ian mensostaton kaj iajn strukturojn. Al tio ni aldonu,ke la eraremo kaj neperfekteco propraj al la homo supozigas ke senerara kaj perfekta reĝimo ĉiam estos nur idealo.

La ekonomio perturbiĝas tuj kiam la produktado de iu artiklo tendencas senbridiĝi. Nu, en iuj fakoj la produkteblecoj fariĝis preskaŭ senlimaj.La plej akord iĝemaj ekonomikistoj povas ja prediki plej larĝan

liberalismon: tamen necesas starigi reguligajn planojn, kiuj moderigas la aktivecon kaj la troproduktadon de l' sektoroj sufokataj sub la troaĵoj. Ekde tiam subite aperas ĉiuspecaj aranĝoj kaj solvoj, kiuj donas al la konsumsocio tiun aĉan karakteron, kiun abomenas la gejunuloj, kiu inspiras iliajn venĝajn aŭ mokajn murskribaĵojn, kaj instigas ilin al ribelo, kiam, en aĝo partopreni la socian vivon, ili ekvidas ties fuŝformojn kaj difektojn. Ĉar la planoj, nepre bezonataj de la moderna ekonomio, implicas provizorajn elturnaĵojn naskitajn de la zorgo ĉiariske savgardi la tradiciajn strukturojn:

- organizita maltusanismo de l' produktado; t.e., ke foje ekhalto reduktas ĝin je tri kvaronoj en la semajno mem kiam elektronika aparato ebligas dekobligi ĝin. Ĉiutage oni vidas la tiel naskitajn problemojn: maldungoj, senlaboreco, alioficigo, ktp...
- detruado de l'stokoj; t.e. forrompiĝo de parto de la produktaĵoj por subteni la profitdonan valoron de la restanta parto. Jen sistemo tre kutima en agrikulturo, kie oni detruas fruktojn, legomojn aŭ cerealojn, kie oni elradikigas vitarojn kaj fruktarbojn, kie oni rekomendas buĉi milionojn da laktodonaj bovinoj, ktp.
- malaltigo de l' kvalito, tiel ke la produktoj havu nur mezlongan uzdaŭron, kio devigas la uzantojn ofte reaĉeti novajn. Tio ne estas legendo. Ĉiu scias, ke la hodiaŭaj aŭtoj pereas fruaĝe kompare kun la nekrevigeblaj "Ford" de la malnova tempo, kaj ke la nunaj skribmaŝinoj havas nur tre moderan vivesperon en komparo kun niaj malnovaj maŝinaĉoj de ĉ. 1920, el kiuj multaj ankoraŭ funkcias.

  Maurice LIME rakontis en libro (2) kiel oni intence reduktis la uzdaŭron de l'razklingoj per eta trovarmigo dum la hardado. Cetere oni tiel trompis perfide la profesian konsciencon de la prirespondaj laboristoj, al kiuj la inĝenieroj kredigis, ke tiu operacio plibonigas la ŝtal-kvaliton.
  Same, por la ŝtrumpoj el sinteza teksaĵo, kiuj povus daŭri eterne se la teknokratiaj staboj ne decidus asigni al ili mallongan vivon per senhezita, vera sabotado de la fabrikado.

Ni rimarku,ke de temp'al tempo sur la merkato aperas ribelanto, kiu lanĉas taŭgan klingon aŭ honestan ŝtrumpon. Jen ekstravaganco, kiun la aĉuloj de l'industrio taksas mallojala konkurenco kaj kontraŭbatalas ĝis la ribelanto kapitulacos kaj la "ordo" restariĝos.

- senbrida kaj delira reklamado; fariĝinte per si mem efektiva industrio, ĝi celas konvinki la individuojn,ke la plej senutilaj aĵoj estas al ili nepre necesaj. Ĝi stimulas la aĉetojn, kreas frenezan akiremon, deziregon konsumi kaj posedi,histerian ĝu- kaj posed-bezonon, kiuj prave aperas tiel ege ridindaj al la ankoraŭ ne perversigita junularo,ke tiu ĉi per tutkomprenebla reago prefere sin turnus al asketismo aŭ al ermitismo. La kondiĉita hejmmastrino ne plu sukcesas trafe elekti: eĉ ŝanĝante sian lavpulvoron ĉiusemajne, ŝi apenaŭ ekprovis la lastan, ke en la ondoj de ŝia radioricevilo kaj sur la bretoj de ŝia magazeno jam aperis alia marko,kiu lavas ankoraŭ pli blanke. Tiu reklamado estas tiel eksterordinara, ke ĝi vendigus konservaĵon el merdo kaj aĉetigus fridoŝrankojn al eskimoj.

- troaj kredit-ofertoj (kredito en si estas bonfara fondaĵo) , por ke la ŝuldoŝargita kliento manĝu sian nefalĉitan tritikon kaj estu jam konsuminta la akiritan objekton, kiam li enspezos la salajron per kiu li pagos ĝian koston kun ties interezoj.

- artefara kreado de efemeraj,rapide anstataŭitaj modoj. La celo estas (per reklamado) konvinki la uzanton , ke eksmodiĝis la uzata objekto, eĉ se ĝi nenion perdis el sia origina stato, kaj ke li devas ĝin ŝanĝi.

La kliento sin lasas des pli facile logi,ke foje oni faris trafan kaj logan modifeton al la koncerna objekto. La aŭtisto aĉetos novan veturilon tial ke oni aldonis ian aĵeton netroveblan en lia malnova aŭto. Sed ofte eĉ ne troviĝas tiu logilo. Persvadi la homojn, ke ili malfruas, ke ili estas eksmodaj, ke ilia ekipaĵo ne furoras, jen la celo de tiu konstanta kampanjo.

Meblo-firmao publikigis reklam-afiŝojn en formo de intervjuoj al privatuloj montritaj al la leganto kiel similaj al li mezfrancoj. Unu el tiuj "konversacioj" celis akceptigi la ideon, ke la saĝa, normala, ordinara persono estas tiu, kiu ŝanĝas sian meblaron ĉiun kvinan

jarom: nia nerva ekvilibro postulus ĉiukvinjaran ŝanĝon de la hejma dekoro, kaj dormomankon aŭ koŝmarojn riskus tiuj,kiuj uzas la saman liton dum pli ol jarkvino!Do ŝanĝu la dormoĉambron (kaj la manĝoĉambron)samkiel vi ŝanĝas la ĉemizon aŭ kiel koketulino ŝanĝas sian parfumon.

Jen kelkaj elturnaĵoj,kiujn aplikas la teknikistoj por artefare stimuli la konsumadon ĉe la homoj. La celo estas, ke ĉi-lastaj aĉetu je profitdonaj kondiĉoj tion, kio eliras el la uzinoj, kie tiuj samaj homoj domaĝas nek sian penon nek siajn tagojn je ofte malpli mondonaj kondiĉoj.

o o
o

Tiujn malsaĝaĵojn tre prave denuncas la aktuala junularo kiel kulpajn sociajn anomaliojn. Unu el iliaj plej gravaj konsekvencoj estas la malŝparado.

Supernombre fabriki objektojn,kiuj sennecese obstrukcos la vendejojn, estas malŝparado. Detrui ilin por restarigi trompan profitdonon, kiu estas nur honta artifiko tute ne respondanta al homa utilo , estas malŝparado. Fabriki miskvalitajn objektojn por devigi la uzanton aĉeti da ili pli ofte, estas malŝparado kaj ankaŭ trompŝtelado. Elturniĝe cerbumi por produkti bagatelojn, tial ke oni estas jam superŝutita per utilaĵoj kaj superfluaĵoj, estas malŝparado (3). Ne rekolekti tion rekolekteblan, ankaŭ tio estas malŝparado; oni asertas, ke tio estus spuro de la epoko de malabundo, kvankam tiu epoko lasis kiel sekvaĵon multe pli timindajn postvivaĵojn, i.a. la kutimon taksi la utilon da aferoj nur laŭ la monprofitoj havigitaj al kelkiuj kaj ne laŭ la servo farita al ĉiuj.

Jen malŝparado, kiam perei oni lasas fervojojn deficitajn sed utile ekspluateblajn.

Malŝparado estas la detruo de turismaj pejzaĝoj kaj de kultiveblaj terenoj: (en Francio) la valo de Eŭro, tiu de la normandia Sejno, tiu de Varo - por tiu ĉi ĵus stariĝis sindikato - estas fuŝegataj per ekscesaj elfosadoj de sablo (4). Oni malŝparas eĉ akvon, elĉerpante iujn basenojn ĝis la limo de

iliaj proviz-volumeno: dragi la sablon el la maro, re utiligi la akvon (kiel Usinor tion faras en Dunkirko), tio tro kostus...

Ĉiam tiu koncepto pri monprofito superas la zorgon pri socia utilo (5).

Kiam la petrolo kaj la naturaj gasoj estos elsekigitaj, verŝajne oni bedaŭros, ke ili estis fuŝuzitaj en malfacile kalkulebla,sed certe grandega kvanto (6).

Plej aĉa malŝparado estas, kompreneble, la armilfabrikado,por kiu konkuras ĉiuj ŝtatoj,ĉiu pravigante la sian per tiu de la aliaj.Tio ja estas la plej gravega malŝparado, cele al neniiĝo korpa kaj biena. Kaj ĝin aprobas la grandaj saĝuloj, la altaj konsciencoj, la sanktaj povoj,la moŝtaj famuloj,la senkoraj partioj kaj la senanimaj Eklezioj !

Tamen la leviĝanta generacio ekkomprenas je kio oni volas senigi ĝin, t.e. je la civilizacio de l'libertempo, normala atingaĵo de la speco de soci-teknika miraklo, plenumita de la generacio, kiu vidis - kiu faris - la transpason de la socio de malabundo al la socio de abundo. Tiu socio de abundo estas ja tiu, en kiu la laboro fine rikoltas la frukton je kiu oni ĝis nun spoliis ĝin.

Tiu koncepto pri estonteco, kiam la homo estos lerninta sane ĝui siajn konkerojn, estas ankoraŭ nur nebula, sed kio estis do la abundo-socio mem, kiam Jacques DUBOIN anoncis ĝin ? (7)

Malŝparo! Malŝparo! Malŝparo!

Georges KRASSOVSKY provis komprenigi al siaj samtempuloj, ke la martiro de fok-beboj hardas kontraŭ la sufero de l'homoj, ke kruelo al tiuj pretigas malhumanecon kontraŭ tiuj ĉi.

Nu! Malŝpari la aĵojn, malŝpari la planedriĉaĵojn, antaŭinkliniĝas malŝpari la homojn. Kaj tre veras, ke la plimultaj nuntempaj homoj estas malŝparataj de la sociordo,kiun ili donas al si aŭ kontraŭvole suferas, kaj kiu malŝparas iliajn talentojn, energiojn,volojn, dezirojn, esperojn kaj eĉ ilian vivon, kiu, en iuj historiaj horoj, vere estas taksita senvalora.

P.V. BERTHIER

Piednotoj:

(1) Tiel laŭ la sendependaj plezuroj, kiujn havigas aŭtomobilo,kiel laŭ la ĉiusemajna katastrofa nombro da trafitaj, eĉ ekstermitaj familioj, ĉiu juĝu libere, ĉu tiu invento estas bonaĵo aŭ plago. De kiam oni inventis la kanonon, vere nenion pli murdan tenis la homaj manoj: tial la kanono estas malpermesita ekster la militkampo. Sed ne estas nia temo fari apologion aŭ proceson de la aŭtomobilo.

(2) Maurice LIME, "Le Maire du Palais" ; Nouvelles Editions Debresse. Paris, 1964:
"Sen uzi specialajn ŝtalojn - el kiuj ni povus fari preskaŭ neeluzeblajn klingojn - Sandvick-ŝtalo, se bone hardita, liverus razklingojn, kiuj daŭrus dum monatoj. Tial niaj laboratorioj devas studi etan revarmigon dum la hardado por limigi je kvin la eblajn razadojn." (Ĉap. IIIa)

(3) La reklamo por la filmo "Pierre et Paul" , kiu drame pritraktas la temon, sufiĉe bone resumas la doktrinon de konsumsocio:
"Ju pli mi laboras, des pli mi gajnas. Ju pli mi gajnas,des pli mi elspezas. Ju pli mi elspezas, des pli mi forĵetas. Kaj ju pli mi forĵetas, des pli bone ĉio funkcias." Ne eblas pli cinike fari el malŝparado virton kaj devizon.

(4) La vitraĵ-malŝparado estas eksterordinara, dum oni ne scias kien iri por fosi novajn sablejojn por fari vitron. Sur la ŝipo Oslo-Kopenhago ni vidis forĵeti en la maron centojn da absolute sendifektaj boteloj. "Tio funkciigas la uzinojn!" oni diras.

Tiun fuŝadon nun kontraŭbatalas la kreskanta uzado de plasto. Tiam subite aperas la problemo de embaraso. Ankaŭ tio eksolviĝos: ĵus oni inventis en Svedio ujon, kiu spontane forvaporiĝas tuj kiam malplena. (Raportis tion "La Tribune de Genève" , kiun citis "France-Soir" de 16.5.1969).

Ni konvinkiĝu, ke rekolektado komence elspeziga, estus en iuj kazoj profitdona en l' estonteco,se taŭge aranĝita.

Tion dirinte, ni bone scias,ke vitraĵoj estas nur

parto en la utiligo de la sablo necesa al domkonstruado.

(5) Oni malpravus kredi, ke malŝparado estas specifa karaktero de privatekonomio. Ŝtato malŝparas ankoraŭ pli ol privatuloj. La t.n. socialistekonomiaj landoj estas vera farejo de malŝparado. "La malbona kvalito kaj la misdistribuado de la industriaj produktoj kaj de l'varoj destinitaj al granda konsumado atestas,ke la ekonomia situacio estas grava, skribis Michel GORDEY (parolante pri Sovetio). La sovetia gazetaro ĉiutage donas multajn ekzemplojn pri tio.Eĉ la Rusoj mem agnoskas,ke pli ol la duono de la ŝtalo fabrikita en Sovetio estas malŝparata".
Vd. la verkon de ZEMLĬAK "U.R.S.S. - Un Etat-patron tout-puissant" (La Ruche Ouvrière, Paris, 1965; 10F), en kiu la ekzemploj pri malŝparado, ĉiuj ĉerpitaj el la soveta gazetaro, estas sennombraj.

(6) Morvan LEBESQUE rakontis,ke en Usono,en la hospitaloj, oni forĵetas la medicinajn termometrojn tuj post la unua uzo, "ne pro higieno, sed tial ke necesas vendi termometrojn!". Ĉiufoje perdiĝas hidrargo, kaj la hidrargo elfosita el la cinabrominoj neniam revenas tien... (......)

(7) Vd. Jacques DUBOIN, "Demain ou le Socialisme de l'Abondance" (O.C.I.A., Paris, 1944) "Abundo estas ekonomia realaĵo,kiu dronigos la homojn en konsternon kaj mizeron tiel longe ĝis ili adaptiĝos al ĝi ; sed,kiam realigita tiu adaptiĝo,"libero trovas sian veran signifon,kaj ĉiu,post la plenumado de sia socia devo, povas agrable pasigi sian vivon, kulturante la sciencojn kaj artojn."

P.V.B.

Pri ĉiuj skoloj subtenantaj la principon de disdona ekonomio pretas informi la Abundana Frakcio de SAT.
Sekretario: Kdo A. Naudé
31 rue Folie l'Abbé,
F 02400 Château Thierry (Francio)

Gérant & imprimeur: Baudé, 47340 Laroque